



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 176

Decembro 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



ESTAS REFOJE TEMPO POR REABONI

Jen rememorigo reaboni *Inter Ni*-on por la venonta jaro. Vi notu ke, anstataŭ altigi la kotizon, nia afabla kasisto povas lasi ilin neŝanĝitaj, eĉ kiam la afranko pligrandiĝos dum la nova jaro. Li vere estas bonkorulo. Bonvolu sendi abon-monon al la adreso de Reni Porter (supre).

ĈU VI NE KONTRIBUU — DENOVE?

La redaktoro dankas al tiuj legantoj, kiuj tiel afable respondis al niaj artikoloj dum la pasinta jaro. Tiuj, kiuj mem kontribuis artikolojn meritas grandajn dank-esprimojn. Kiel kutime, la redaktoro denove serĉas materialon. Bonvolu pripensi kion vi mem povas kontribui por vere fariĝi "inter ni."

SALUTON DE LA REDAKCIO



La plej feliĉajn bondezirojn de la festa sezono deziras al ĉiuj inter ni la redakcio. Bonvenon post nelonge al la nedisputebla komenciĝo de la tria jarmilo, kaj bonan novjaron al ĉiuj.



Recenzo

Dr. Esperanto's International Language, Introduction & Complete Grammar by Ludovic Lazarus Zamenhof. [La Internacia Lingvo de D-ro Esperanto, Enkonduko & Kompleta Gramatiko fare de Ludoviko Lazaro Zamenhof, por Angloj.] Angla eldono, kiun tradukis R.H. Geoghegan de Balliol Kolegio, Oksfordo, 1889. Nova presado 2000. Gene Keyes redaktis kaj verkis Antaŭparolon. Verkista Eldonejo, Halifax, Nov-Skotio, Kanado. ISBN 0-9698643-3-7. 21.7 × 13.8 cm kun 50 paĝoj; oni presis bonkvalite kaj kun papera kovrilo; Kanadaj \$5.00.

Per tiu ĉi libroeldono Gene Keyes (pr. Ĝin Kajz) havebligas libron kiu estis tre grava en la frua historio de Esperanto inter parolantoj de la angla. Zamenhof publikigis la unuan libron en la rusa lingvo en la jaro 1887 kaj mallongtempe poste aperigis la saman libron en la pola, la franca kaj la germana lingvoj. Tamen Zamenhof ne sufiĉe regis la anglan por traduki, kaj la unuan anglan tradukon faris Julius Steinhaus en la jaro 1888. Malfeliĉe, tiu traduko estis fuŝa. Brila juna irlandano, Richard H. Geoghegan (pr. Gejgun), tuj sendis al Zamenhof ĝustan tradukon, kiun Zamenhof mem eldonis en la jaro 1889. La traduko de Geoghegan fariĝis rekonata kiel la lasta el la kvin originalaj nacilingvaj versioj de la „Unua Libro”. Oni povas legi pli pri la historio en artikolo far Gene Keyes en *Inter Ni*, numero 147 (julio, 1998), paĝoj 1-2, kaj en *Zamenhof, Aŭtoro de Esperanto*, fare de Marjorie Boulton, J. Régulo, La Laguna, 1962, paĝoj 55-56.

Estas enkonduko, klarigo de la gramatiko, kaj ekzemplo de letero, de ekstraktoj el la Sankta Biblio kaj de originalaj kaj tradukitaj poemoj. Ankaŭ estas kvar ekzempleroj de la promesformularo, kiun Zamenhof petis la leganton subskribi, kaj vortaro de Esperanto en kiu troviĝas 900 radikoj. Keyes presis tre fidele al la originalo, kaj liaj propraj notoj estas tuj identigeblaj. Eĉ restas la ĝenaj komoj inter la radikoj kaj gramatikaj finaĵoj. Tamen, pro bona presado kaj granda literaro, la teksto de Keyes estas sendube pli facile legebla ol tiu de Zamenhof. Keyes diris en sia antaŭparolo, ke li korektis kelkajn preserarojn kaj eble faris novajn; en la vortaro mi trovis radikojn „fromaj-” anstataŭ „fromaĝ-” kaj „gris-” anstataŭ „griz-”.

La libro povas esti interesa ne nur por la amanto de historio sed ankaŭ por multaj angleparolantaj Esperantistoj kiuj per la tralegado povos vidi kaj senti kia nia lingvo estis en la komenco.


— Steĉjo Norvell

Rimarko: Estas la unua okazo kiam aperas en *Inter Ni* recenzo pri libro publikigita fare de membro de nia loka Esperanto-Rondo. La kialo estas, ke ĝis nun, laŭ nia scio, neniu en nia grupo aperigis Esperanto-libron. Nian gratulon al Gene Keyes!

Ĉu Io Nova?

En n-ro 67 (Novembro 1991) de *Inter Ni* estis artikolo „Ne ŝtelu.” La kvara punkto estis: „Ŝtelu ĉi tiun libron” (1971) – titolo de libro verkita de usona revoluciulo de la 1960-aj jaroj, Abbie Hoffman.

Antaŭ nelonge mi aĉetis libron kun la titolo *Ŝtelu ĉi tiun komputoran libron* (1997), verkitan de Wallace Wang. Ĝia sub-titolo estas „Kion oni ne rakontas al vi pri la Inter-reto.”



La dua estas pli aktuala, sed sendube Salomono pravis, dirinte „Ne ŝtelu.”

— Ed Harler

ESPLORINTO DE LA MORTOTUKO DE TORINO MORTIS

D-ro Alan D. Adler mortis la 10-an de junio 2000. Li estis la iama help-profesoro de molekula biologio ĉe la Universitato de Pensilvanio kaj spertulo pri sang-kemio, kiun la Vatikano petis esplori la Mortotukon de Torino. Dum 1967 li forlasis UdP kaj fariĝis superstaba sciencisto ĉe la Novangluja Instituto. En 1988 li montris ke la figuro estis ulo kies sango venis el fortege truditaj vundoj. Li ne povis prui ke la imago de la figuro sur la mortotuko estis tiu de Jesuo.

— Laŭ informo el *The Pennsylvania Gazette* (La Gazeto Pensilvania), septembro-oktobro 2000, tradukis Ed Harler.

PLIAJ IDEOJ PRUNTEPRENITAJ

Ideo-ŝtelado de unu homo estas plagiato; ideo-ŝtelado de multaj iĝas profunda esploro.

Mi preskaŭ havis psikan amikinson, sed ŝi forlasis min antaŭ ol ni interkonatiĝis.

En la poŝto, fakturoj vojaĝas duoble pli rapide ol ĉekoj.

